

奈良エスペラント会  
会誌

# Kornumo

つのふり

N-ro 113  
2023-04-19

作成：竹森

## enhavo

1. 4月、5月学習会・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・2
2. 今後の行事予定・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・2
3. その他・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・3

奈良エスペラント会 奈良市西登美ヶ丘7丁目1-11 秋葉方  
会費口座 ゆうちょ銀行 14580-11209501 ナラエス<sup>o</sup>ラントカイ

奈良エスペラント会の皆さん、こんにちは。La Movado が発行されましたので、会誌「Kornumo」と一緒に送付します。4月22日の学習会に参加される方にはLa Movadoと会誌を手渡しします。また2022年度収支報告者送付します。内容ご確認下さい。異議等があれば連絡下さい。4月までに異議等がなければ承認頂いたものと致します。

## 1. 4月、5月の学習会

日時：4月22日（土）10：30～

場所：西部公民館 5階 第四講座室

- ・Gerda malaperis Ĉapitro 16を予習しておいて下さい。
- ・長谷川テルの歌、「希望の鳩、ヴェルダマーヨ」1番、練習。

日時：5月20日（土）10：30～

場所：西部公民館 5階 第三講座室

- ・Gerda malaperis Ĉapitro 17を予習しておいて下さい。
- ・長谷川テルの歌、「希望の鳩、ヴェルダマーヨ」1番、練習。

## 2. 今後の行事予定

各地で開催される行事等の情報をまとめました。太字が更新された情報です。

開催日	行事名	場所	内容
2023年 3/25(土)～3/26(日)	La 3a Vintra Lernejo	神戸市北区しあわせの村	Movado 参照
2023年 4/8 (土) 13時～15時	観桜祭	京都府庁旧本館	京都エスペラント会の出し物 エスペラントって何
2023年 4/30 (日)	「長谷川テル訪問 記念の碑除幕式	般若寺	
2023年 5/20日(土)～5/21(日)	九州大会		Movado 参照
2023年 5/21(日)	KLEG 委員会・総 会	豊中市民公民館	
2023年 6/6 (土)～6/7 (日)	第71回 関西大会	姫路市イーグレひめじ	一般講演 能楽師、江崎欽次郎さん Movado 参照
2023年 10/21 (土), 22 (日)	第11回 日本大会	拠点会場：川崎市総合自治会館 (武蔵小杉駅下車)	大会テーマ： Kion < Esperanto > nun revas por la mondo? / < エスペラント > がいま夢見る世界は何か

### 3. その他

#### 3.1 観桜祭

京都府庁旧本館で、京都エスペラント会が4月8日（土）13時から15時旧府庁会議室で出し物を行いました。奈良からは中西さんと竹森が参加しました。



プログラムと簡単な感想は下記 URL に載せています。

<https://sites.google.com/site/naraesperanto/Home/evento>

#### 3.2 関西大会

LaMovado 参照下さい。改訂 informilo が入っています。また更に分科会で追加がありました。佐藤守男さんのエスペランティスト9条の会と菊島和子さんのクイズで知ろう正しい「エロシエンコ」です。下記 URL が最新 Informilo です。

[http://www.kleg.org/kek/kek71/info-kek71a\\_rev2.pdf](http://www.kleg.org/kek/kek71/info-kek71a_rev2.pdf)

#### 3.3 「長谷川テル訪問記念の碑」除幕式

第一部の除幕式が般若寺で13時から14時まで開催されます。こちら参加自由です。奈良に新しい名所ができて嬉しい限りです。

#### 3.4 その他

- ・5/21（日）豊中市民公民館で KLEG 委員会・総会が開催されます。

#### 3.5 <https://uea.facila.org/> に Verda Majo の記事、

前回掲載したものの再掲しました。

La japanan esperantistino HASEGAWA Teru (Verda Majo), 長谷川 テル (1912-1947), la naciistaj regantoj de Japanio konsideris perfidulo. Ŝi ekloĝis en Ĉinio kune kun sia ĉina edzo Liu Ren. Post ŝia morto la ĉina registaro dum multaj jaroj silentis pri ŝi, malgraŭ la forta subteno, kiun ŝi donis al la rezisto de la ĉinoj kontraŭ la japanaj invadantoj per artikoloj en Esperanto kaj per radio-elsendoj en la japana.

Naskiĝinte la 7-an de marto 1912 en la gubernio Yamanashi, ŝi en 1929 ekstudis en la Virina Altlernejo de Nara. Pro siaj maldekstraj opinioj ŝi en septembro 1932 estis portempe arestita kaj fine forigita el la altlernejo.

En somero 1931 Teru komencis lerni Esperanton, per kiu ŝi ligis kontakton unue kun maldekstraj literatur-amantoj en Japanio, poste ankaŭ kun ĉinaj esperantistoj. En 1935 ŝi kontribuis al la ŝanhaja revuo La Mondo per artikolo pri la stato de la virina movado, precipe la subpremo de virinoj en la japana socio. Pro ilia komuna interesiĝo pri Esperanto kaj literaturo ŝi ekkonis Liu Ren, ĉinan studenton en Tokio. La du geedziĝis en aŭtuno 1936 – sekrete, ĉar Teru timis la malaprobos de siaj gepatroj.

Liu Ren reiris al Ĉinio en marto 1937, kaj Teru sekvis lin en aprilo al Ŝanhajo. La urbo nelonge poste estis atakita de la japana armeo. Teru tuj decidis subteni la viktimojn de la invado. Verkante en Esperanto ŝi ne nur aprobis la “justan reziston” de la ĉinoj, sed ankaŭ klopodis instrui al siaj “japanaj fratoj”, ke ilia malamiko ne estas la ĉina popolo, sed la japana imperiismo. En radio-elsendoj ŝi fortege atakis la propran, japanan registaron. En japanaj gazetoj ŝi pro tio estis atakata kiel “dolĉ-voĉa naci-perfidulino”.

Pro la milito Teru kaj ŝia edzo devis plurfoje ŝanĝi sian loĝlokon, ĉiam per la helpo de esperantistoj. Uzante la plumnomon Verda Majo, ŝi regule verkis artikolojn por la revuo Heroldo de Ĉinio. Ĉe la sama eldonejo aperis ankaŭ ŝia traduko de la kontraŭmilitisma romano Vivantaj soldatoj de Ishikawa Tatsuzō, kaj ŝia aŭtobiografio En Ĉinio batalanta (1945).

La familio, kun intertempe du infanoj, ekloĝis en Jiamusi, Manĉurio, la hejmlando de Liu Ren. Kiam la tria ido estis naskota, Teru eksciis, ke kiam Liu edziĝis kun ŝi, li jam havis ĉinan edzinon. Ŝi ne plu deziris naski. Sekve de abortigo ŝi malsaniĝis, kaj mortis la 10-an de januaro 1947. Tri monatojn poste mortis pro malsano ankaŭ Liu Ren.

En la postmilita Japanio, esperantistoj tuj komencis teni viva la memoron pri Verda Majo. Iom post iom preskaŭ ĉiuj ŝiaj verkoj estis tradukitaj en la japanan; aperis pluraj japanlingvaj libroj pri la vivo de Hasegawa Teru.

En 1979 la revuo El Popola Ĉinio komencis aperigi artikolojn pri ŝi, kaj en aŭgusto de tiu jaro ŝiaj filo kaj filino vizitis Japanion. Filmo komune produktita de japanoj kaj ĉinoj, kun la titolo La sopiranta stelo, prezentis ŝian vivon. Ĝi estis montrita en la japana televido en 1980, poste ankaŭ en Ĉinio.

En 1982 Ĉina Esperanto-Eldonejo en Pekino publikigis la 500-paĝan kolekton Verkoj de Verda Majo. La postan jaron la geedzoj estis enterigitaj en la “tombejo de martiroj” en Jiamusi. Sur la tomboŝtono aperis la vortoj “Batalanto por internaciismo Verda Majo” . En 1983 aperis ĉinlingva memorlibro pri ŝi.

Ulrich Lins